



Du vizitantoj ĉe la pinto de Monto Soledad ĝuas la panoramon.

Mont(et)o Soledad

Soledad (esperante: "soleco") estas 822 futojn (251 metrojn) alta monteto apud La-Jolla. Kompreneble, por niaj NASKanoj el montoriĉaj regionoj, nura altaĵeto ne vere meritas la titolon "monto"! Sed kia ajn la nomo, de la parko ĉe la supro oni povas vidi vere belegan pejzaĝon.

Hodiaŭ ni ekskursetos tien por mallonga vizito. Oni ne devos grimpi: ni veturos aŭte al la montopinto danke al niaj afablaj ŝoforoj Mar kaj Neal. La vojaĝo daŭros nur mallonge, ĉar la loko estas tre proksima. Kunportu vian fotilon!

Renkontiĝu je la 2-a antaŭ Asante.

La Mirinda Familio Frapadem

Ie en Esperantujo (unu el la plej strangaj landoj en la tuta stranga mondo) vivis la familio Frapadem. La familio konsistis (kiam la okazoj de ĉi tiu rakonto okazis) el kvar personoj: la maljuna praavo, Fi Frapadem, la ŝercema avo, Falemul Frapadem, la sukcesa Patro, Fumant Frapadem, kaj la adorinda filo, Fiiĝont "Fiiĉjo" Frapadem. Fiiĉjo loĝis kun sia Patro; Falemul kaj Fi loĝis solaj en du proksimaj urboj. Unu tagon, Fumant pensis ke Fiiĉjo devus viziti siajn avon kaj praavon. Ili veturis unue al la domo de la avo. Kiam Fumant diris al Falemul ke li planis veturi al la domo de Fi, Falemul diris ridetante ke li ne vidis sian patron dum kelkaj jaroj, kaj vere volis veni kun Fumant kaj Fiiĉjo. Do, la tri Frapadem-oj enaŭtiĝis kaj ekveturis praavdomen.

Kiam la veturantaj Frapadem-oj alvenis, la praavo salutis ilin kore. Bastonenmane, li venis el la domo kaj manpreme salutis Fiiĉjon.

"Antaŭ ol mi forgesos, mi volas foti ĉi tiun fotindan familion," Fi Frapadem diris mallaŭte per voĉo, kiun tempo jam malfortigis. "Staru tie, antaŭ la planto, kaj ridetu!"

"Ni ne nur ridetos," diris Falemul. "Ni faros ion, kiu estas iomete pli interesa." Dirinte tion, li levis Fumanton, kiu havis Fiiĉjon en siaj brakoj, en la aeron! "Nun ni estas familiarbo, ĉu ne?" diris Falemul.

Bedaŭrinde, la arbo ne povis stari tre longe. Foriris la forteco de Falemul, kaj li kaj Fumant kaj eta Fiiĉjo falis sur la plankon, rompante la planton.

"Vi rompis mian planton!" kriis Fi al Falemul, kaj frapis sian filon.

"Nu, mi falis ĉar vi pezas tro multe!" kriis Falemul al Fumant, kaj frapis sian filon.

"Tute ne! Ni falis ĉar mia filaĉo moviĝis tro multe!" kriis Fumant, kaj frapis Fiiĉjon.

"Sed... sed..." flustris Fiiĉjo. Li ne havis filon, kiun li povus frapi.

"Ni iras hejmen," diris Fumant, kaj li kaj Fiiĉjo ja tuj iris tien. Kiam ili alvenis, Fiiĉjo serĉis sian hundon, kaj kiam li trovis ĝin, li ĝin piedbatis kolere. For, for la hundo kuris. La hundo kuris el la domo kaj en la straton. La hundo kuris tra la urbon, kaj tiam el la urbo. Ĝi kuris dum tagoj kaj noktoj, kaj kiam ĝi bezonis dormon, ĝi dormis. Ĝi iris ĝis ĝi atingis la domon de Fi. Starante ekster la domo, sub ĉielo kiu estis plena de steloj, ĝi bojis per fortega voĉo. Fi ellitiĝis kaj iris al la fenestro por kii al la hundo, kiu vekis lin. Sed dum li iris fenestren, li stumblis, kaj falis, kaj dolorigis la kokson. Li ne povis restariĝi. Dum Fi sidis sur la planko, la bojado ne ĉesis; tutan nokton la hundo bojis, kriante je la steloj kaj la luno.

—Steĉjo

El la kalendaro...

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	merkredo	ĵaŭdo	vendredo	sabato
matene	klasoj	klasoj	klasoj	Ekskurso al San-Diego
post-tagmeze	2 ptm: Ekskurso al Monteto <i>Soledad</i>	2 ptm: trezorserĉado!	2 ptm: artpromeno kun Meja	
vespere	7 ptm: Bertilo prelegas en la komuna salono	6 ptm: USEJ-aferoj	7 ptm: Festo ĉe la domo de David JORDAN	<i>libera</i>
nokte	<i>libera</i>	8 ptm: dancado(?)	<i>libera</i>	<i>libera</i>

Fotoj rigardeblas

Kelkaj el ni faradas fotojn dum NASK. Mi estas unu el ili, kaj mi volas sciigi al vi la eblon rigardi miajn fotojn.

Mi metis miajn fotojn en mian fotopaĝon ĉe Ipernity kaj kreis tie du albumojn: "NASK 2008" kaj "Kalifornio 2008". En "NASK 2008" troviĝas plejparte fotoj de nia kursaro kaj de la partoprenantoj. En "Kalifornio 2008"

troviĝas ankaŭ fotoj de plantoj, bestoj, arkitekturo kaj aliaj.

Por atingi la fotojn vi iru al mia ĉefpaĝo pere de la ligo

www.ipernity.com/home/birke

Poste trovu tie supre la ligon "Albumoj". Elektu albumon kaj alklaku ĝin.

Eblas rigardi ĉiun foton unuope aŭ lanĉi la bildoprezenton. Kaj kompreneble vi estas bonvenaj rigardi ankaŭ miajn aliajn

fotoalbumojn tie!

Do, bonan rigardadon!

—Birke

PS: Komentoj kaj elŭtoj funkcias nur por membroj de Ipernity. Sed estas tre facile membriĝi tie senpage!

PS2: Mi esperas, ke ankaŭ aliaj, kiuj fotas kaj metas la fotojn ien, sciigos pri la eblo rigardi kaj eble elŭti ilin...

Ŝerco?

Du orfiŝoj renkontiĝas sub la orifico de akvario. La stulta diras "Vi pafu, kaj mi stiros."

La lerta respondas, "Fole! Cisterno ne estas tanko!"

"Ĥo! diras la unua. "Hodiaŭ mi jam lernis ke bordo ne estas banko, kiam mi tien iris ĉar mia vosto estas orfino (or-fino)."

—Vido

Ĉu vi volas sving-danci?

Mi iros al dancejo ĵaŭdon por svingdanci. Supozeble ĝi komenciĝos je la naŭa, kiam busoj ne plu haveblas.

Se vi interesiĝas pri svingdancado, bonvolu paroli kun mi, por ke ni sciu kiom da aŭtoj ni bezonos.

—Simono

Kalembura kadro



La solvo por la lasta enigmo estas "kol-ego(n)".
La hodiaŭa enigmo estas: ___ N - ____.

Baki vegane?

“Veganoj” estas tiuj, kiuj ne aĉetas produktaĵojn de bestoj, inkluzive laktaĵon kaj ovojn. La celo, plej kutime, estas simple ne suferigi aŭ mortigi senbezone.

Oni ofte supozas, pravigeble, ke la produktado de laktaĵo kaj ovo estas sufiĉe sendolora afero. Bedaŭrinde la realo estas mala. Kelkmaniere, ekzistas eĉ pli da sufero en laktaĵoj kaj ovo ol en viando.

Kiam mi veganiĝis antaŭ sep jaroj, mi unue bedaŭris la mankon de kelkaj el miaj plej ŝatataj manĝaĵoj: kolbaso, glaĉiaĵo, viandbuloj... kaj kompreneble bakaĵoj kiel keksoj! Tamen mi baldaŭ trovis ke eĉ tiaj manĝaĵoj haveblas por veganoj. La veganaj versioj estas ne nur pli bonaj por la homa sanstato, sed ankaŭ por la sanstato de nia Tero. Eĉ pli feliĉe, ili povas esti pli bongustaj!

Baki vegane estas aparte facile, eĉ kiam recepto postulas ovojn aŭ laktaĵon, ĉar ekzistas multaj facile haveblaj anstataŭaĵoj.

Bedaŭrinde mi ne estas lerta bakisto, sed dum la kursaro mi provas baki kelkajn dolĉaĵojn por vi en la duone funkcianta fornaĉo de mia ĉambraro...

Jen recepto por tiuj simplaj biskvitoj, kiujn ni kune manĝis dum la interkona vespero.

—Hoss

Oranĝmigdala biskoto

- **1/3-taso (80 ml) da margarino, moligita**
- **2/3-taso (170 ml) da sukero**
- **Anstataŭaĵo por du ovo (ekz. tofuo)**
- **1 tekulero (5 ml) da eltiraĵo de vanilo**
- **2 tasoj (500 ml) da faruno (neblankigita)**
- **1 1/2 tekuleroj (7 ml) da bakpulvoro**
- **1 1/2 tekuleroj (7 ml) da raspita oranĝoŝelo**
- **1/2-taso (125 ml) da fenditaj migdaloj**

1. Varmigu fornon ĝis 350 °F (177 °C).
2. Kremigu la margarino kaj sukero ĝis la miksaĵo fariĝas lanuga. Enmiksi la ov-anstataŭaĵon kaj vanilon, kaj poste la farunon, bakpulvoron, oranĝon kaj migdalojn. Lasu la paston malvarmigi en fridujo dum 10 minutoj.
3. Duonigu la pastobulon kaj platigu la duonojn en blokojn proks. 2 colojn (5 cm) dikaj. Metu

Tradukita el la kuirlibrego *Vegan Planet* de Robin ROBERTSON

Kiel baki sen ovoj?

Ofte oni povas facile “veganiĝi” ov-postulajn receptojn per facile haveblaj anstataŭaĵoj. Ekzemple, en bakaĵoj, ĉiu el la jenaj egalas al unu ovo:

- **Ener-G Egg Replacer:** marko de ov-anstataŭaĵo farita el terpom-amelo. Trovebla ĉe grandaj manĝaĵo-varejoj, ekz. *Whole Foods*. Kunmiksi 1 1/4 tekulerojn (6 ml) da *Ener-G*-pulvoro kun 2 servkuleroj (30 ml) da akvo.
- **Frukto:** kunmiksi 1/2-tekuleron (3 ml) da bakpulvoro kun 1/4-tason (60 ml) da kaĉigita frukto.
- **Tofuo:** verŝu akvon el bloko de molstila tofuo kaj bone kunmiksi 1/4-tason (60 ml) de la tofuo kun 1/2-tekuleron (3 ml) da bakpulvoro.
- **Linosemoj:** pulvorigu 1 servkuleron (15 ml) da semoj en miksilo. Aldonu 3 servkulerojn (45 ml) da akvo kaj miksu ĝis la likvaĵo viskoziĝas.

sur oleitan bakpleton kaj platigu iomete plu. Baku 25-30 minutojn, ĝis la blokoj orbruniĝas kaj pikilo ne plu eltiras malsekan paston. Elprenu de la forno kaj malaltigu la temperaturon ĝis 275 °F (135 °C).

4. Lasu la blokojn malvarmigi 10 minutojn, kaj poste tranĉu en pecojn larĝajn je 1/2-colo (5 cm). Aranĝu la pecojn sur iliaj flankoj en senolea bakpleto kaj baku ĝis ili krustiĝas, proks. 8-10 minutojn. Lasu ilin tute malvarmigi kaj metu en bone fermitan ujon; ili restos freŝaj tie dum kelkaj tagoj.



(Pseŭdo)eŭkaliptoj ĉe UCSD

La eŭkalipto estas unu el la simboloj de UCSD. Ĉu vi rimarkis kiom da ili troviĝas ĉi tie? La tereno nombras ĉirkaŭ 220 000 eŭkaliptojn. La eŭkalipta arbo originale venis al Kalifornio de Aŭstralio. Ekzistas 700 specoj en tiu lando kaj kelkaj el tiuj kreskas diversloke inter la konstruaĵoj ĉirkaŭ la universitato.

Oni originale importis la semojn por planti kaj krei novajn arbarojn por anstataŭi la rapide malaperantajn indiĝenajn arbojn. Tiu plano fiaskis ĉar la ligno facile fendiĝas kaj ne taŭgas por konstruado. Sed antaŭ oni eksciis tion, granda projekto komenciĝis ĉe UCSD.

Komence en 1910 kaj dum kelkaj jaroj poste, eŭkaliptoj estas plantitaj de 400 senlaboruloj kaj malliberuloj ĉe *Torrey Mesa* kie nun situas la nuna UCSD. Ili plantis 300 000 eŭkaliptajn arbojn, plejparte sukergumojn.

La restaĵo de tiu plantado estas la arbaro malantaŭ la Studenta San-centro. Oni povas rimarki la rektajn vicojn de la planita plantado.

Dum jaroj la arboj kreskis kaj ne spertis problemojn. Sed en 1984 alvenis aŭstralia skarabo, la eŭkalipta longkorna boranto. Ĝi povas mortigi arbon en du semajnoj. Dum la 80-aj kaj 90-aj jaroj, centoj da arboj mortis kaj neniu sciis kiel halti la atakon.

En 1992, sciencisto malkovris etan vespon kiu estas parazito de la skarabo. La ovon de la skarabo infektas malmatura formo de la vespo, kiu poste maturiĝas en la skaraba korpo kaj finfine eliras, mortigante la gastiganton.

Babel'

Ekpluvas bomb' da dia glor'.
Fosiĝas tomb' sub velka flor'.
Ĥaosas voĉ' de kria ĥor'.
Ĥu pro diboĉ' jen la horor'?

—Aĉjo

Tiu parazito savis la eŭkaliptojn por iom da tempo. Poste venis aliaj insektoj, sed ili ne estis tiom danĝeraj kiel la unua skarabo. Nun la arboj frontas atakojn de eŭkaliptaj malamantoj kaj la buldozoj de konstruado. La universitato havas regulon kiu deklaras, ke kiam arbo estas detruita, alia devas esti plantita ie sur la tereno. Do verŝajne la eŭkaliptoj restos por ĉiam simbolo de UCSD.

—Ellen



Kelkaj el la eŭkaliptoj ĉi tie fakte estas pseŭdo-eŭkaliptoj: duone lignaj, duone metalaj (plumbaj). Cetere, unu eĉ kantas! Ĉu vi volas scii pli? Iru kun Meja ĉi-vendrede je la 2-a ptm!

Kio estas la "Vojaĝ-skarabo"...
kaj kiel ĝi vojaĝas?

Venu morgaŭ al la trezor-
serĉado por ekscii!